Henri MASSON

# TABAKISMO
# KAJ
# EMANCIPIĜO

Suplemento
de
La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
113 B 1976 2 FF

# Enkonduko

Nova religio, nova opio por la popolo, jen la tabakismo !

Pli kaj pli da viktimoj falas en la kaptilon de la regantaj burĝaroj.

Prave, H. Terrace (Teras), en la franca satira gazeto "Le Canard Enchaîné" (La katenita anaso), skribis, ke "inteligenta informado pri tabako montrus al la klarvida generacio de 1968, ke en nia konsumsocio, la alienigo komenciĝas je la unua cigaredo".

Kvankam la malbonefiko de la tabako estas jam de longe pruvita, multaj "evoluintaj" personoj volonte uzas tiun amassklavigilon. Sed la eraro konsistas ĝuste en tio, ke ni montru la nuran malsanigan flankon de tiu emo.

Ĉiuj registaroj trovas en ĝi profitodonan rimedon por plenigi la ŝtatan kason. Ĉiuj argumentoj ŝajnas bonaj el la buŝo de la registaranoj. Sed, videble, pli gravas mono, ol vera sanpolitiko. Bone ilustras tion la sinteno de Poniatowski, eks-ministro pri saneco en Francio, kiu diris pri la vakcinado :

"La problemo de individua libereco, sur tiu kampo, estas falsa problemo. Ne vakcinita kaj ne protektita individuo konsistigas minacon por la sociaj grupoj, kiuj ĝin ĉirkaŭas."

Stranga deklaro flanke de persono, kiu responsas pri la saneco de siaj samlandanoj, precipe kiam oni pensas, ke en Francio fariĝas ĉiujare viktimoj de narkotaĵoj kelkaj dekoj da personoj, de alkoholo 35.000, de tabako inter 24.000 kaj 60.000 (el kiuj 12.000 mortas pro la nura pulmokancero) !

Des pli stranga deklaro, ke la sama ministro neniam iniciatis favore al lukto kontraŭ tiu lasta plago, ekzemple kiel en Usono, per starigo de obstakloj kontraŭ la portabaka reklamo, inter kiuj bona informado de la publiko estus jam granda paŝo.

Do, kvankam la temo de tiu broŝuro tute ne pritraktas la problemon de vakcinado, la jena demando tamen

sin trudas : ĉu povas esti vera saneca politiko sen bona socia politiko ?

Kiam homoj estas malfortaj pro tro longaj labortagoj, pro ege malbonaj vivkondiĉoj kaj manko de higieno, la organismo ne plu kapablas lukti sola kontraŭ la malsano. Tiam, la vakcinado fariĝas ĉefe rimedo por daŭrigi la socian malordon kaj prokrasti la alvenon de vera socia politiko.

Same kiel amasa vakcinado, amasa tabakismo estas profitfonto... escepte por la impostpagantoj kaj uzantoj.

Alian motivon de tiu sinteno flanke de la publikaj aŭtoritatoj ni trovas en la fakto, ke tabakfumado ligas la fumemulon al la sistemo. Eĉ t.n. "revoluciulo", kiu fumas, fariĝas bona mon-apoganto de la socia ordo, kiun li kontraŭbatalas... plej ofte nur per vortoj ! Vera lukto por popola liberiĝo kaj emancipiĝo postulas pli ol kriadon. Ne mirige, ke Napoleono la I-a donis al S.E.I.T.A. (Servo de Ekspluatado Industria de la Tabakoj kaj Alumetoj) la monopolon de tiu negoco : 66 % el la enspezoj provizas la ŝtatan kason (t.e. 4 % el la fiskaj enspezoj por Francio). Tiu monopolo, pro la traktato de la Komuna Merkato, malaperos la 1-an de januaro 1976... kio ne signifas, ke la ŝtato rezignos tiun monfonton.

La rolo de la tabako en industriaj landoj estas komparebla kun tiu de la kokao, ekzemple ĉe la Altebenaĵoj de la peruaj Andoj, kie la indiĝeno "ekmaĉas kokaon, ĉar li ne havas sufiĉe por manĝi, kaj poste ne sufiĉe manĝas, ĉar li maĉas kokaon" (laŭ U.N., Studkomisiono pri la kokafolio).

Sed, "ne nur panon la homo bezonas...", kaj la tabako plej ofte ŝtopas - aŭ donas la iluzion ŝtopi - la vakuon de la spirito, tiun malsaton de la moderna homo.

Bedaŭrinde, tiu procezo estas bone konata de ĉiuj ekspluatistoj - inkluzive de la ministroj pri Saneco - sed, se narkotaĵnegocistoj laboras kaŝe, ni konstatas male, ke mirinde organizita reto de sanfuŝaj entreprenoj disfloras tute malkaŝe sub ĉiuj reĝimoj, kun aprobo aŭ partopreno de la ŝtato mem !

Ni revenu al la peruaj Altebenaĵoj :

"Sed la metodoj, kiujn uzas la latifundio-posedanto, por ke ĝia laboristaro ne fuĝu aŭ por ke ĝi kresku, estas multoblaj kaj same efikaj, nome, stimulante la malvirtojn

de la indianoj, oni kontribuas al rapida ruinigo de ilia individua personeco.

Efektive, por kiu estas en daŭra konflikto inter sia persona baza strukturo kaj la socia perturba medio, la pluigo de la ekvilibro, aŭ almenaŭ la impreso kompensi la forestojn, la mankojn ĉiuspecajn, kiel fraŭdiĝojn, estas ebla dank'al troa konsumado de stimulaĵoj-narkotaĵoj, kiaj kokao kaj brando." (El la libro "Les oubliés des Andes" - La forgesitoj de la Andoj - de Sabine Hargous, eld. Maspero).

Ĉu la vorto "emancipado", ofte uzata dum la lastaj jaroj, kongruas kun tiu emo, kiu disvolviĝas dank'al rekta aŭ nerekta reklamado : la tabakfumado ?

Tiu emo ekaperis en la kortegoj kaj en burĝaj medioj. Tiam, la tabako estis ekzotika produkto. Tiele, nova modo kreiĝis, kaj pro tiu nova bezono, kultivado estis kuraĝigita en Eŭropo. Poste, tiu inklino gajnis ĉiujn mediojn, kie regas angoro, nervemo, timo, sentaŭgeco, nesufiĉa memfido, senlaboreco aŭ mallaboremo, kaj precipe trovis en ĝi konsolon la loĝantoj de kazernoj kaj bordeloj, tiuj temploj de la kontraŭ-emancipado.

Sufiĉas observi fumantojn por konvinkiĝi, ke plejofte ili imagas per tiu sinteno demonstri sian memfidon. Oni tuj divenas la reflekson de adoleskant(in)o, kiu, per imitado de la plenkreskuloj, provas montri la firmecon de sia karaktero... bedaŭrinde, kiam li (ŝi) fariĝas plenkreskulo, lia (ŝia) karaktero ne estas sufiĉe firma por forigi la jam enradikigitan manion.

Trovante nek la kapablon, nek la forton barakti kontraŭ ĝi, li (ŝi) eksterigas signojn de aplombo aŭ fiereco, kiuj ne akordiĝas kun liaj (ŝiaj) sentoj. Li (ŝi) bezonas trovi motivon por transformi sian eraron en praveco, aŭ senkulpigi sin per vantemo.

Por adoleskant(in)o, fumado povas ankaŭ esti rimedo por esprimi ribelemon, agresemon kontraŭ la subpremo de la plenkreskuloj, de la socia aŭ familia medio. Sed li (ŝi) rapide fariĝas viktimo de sia provokemo.

La statistikoj indikas, ke pli kaj pli da junuloj kaj virinoj fumas, neniam pripensinte, ke tabakismo tute ne estas indico pri emancipiĝo; ĝi montras tute male, ke ili fariĝis viktimoj de adoleskantaj iluzioj pri la per-

soneco kaj nevundebleco de la plenkreskuloj.

Finfine, ĉu la tabakismo ne estas la plej fidela spegulo de nia epoko ? Ĉu la tabako ne estas la plej taŭga emblemo de la ĝis nun plej perfekte organizita sistemo de sklavigo, en kiu kuniĝas malŝparego, malordo, mensperturbigo, alvokoj al senbrida kaj senutila elspezo, grandskala ekspluatado de ĉiuj emoj, nome : la KONSUMSOCIO ?

## ŜTATA INCENSO

La tabako aperis en Eŭropo ĉirkaŭ la jaro 1560. Ĝia kultivado disvastiĝis tra la sama kontinento proksimume ekde la jaro 1600. Kelkajn jardekojn poste, gravaj minacoj ŝvebis super la uzantoj de tiu nova produkto, same flanke de la papo, kiel de la caro de ĉiuj Rusioj, de la sultano de Turkio, kiel de la ŝaho de Persio : ekskomuniko, korpaj punoj, deportado, ktp.

Hodiaŭ, la nefumantoj estas kvazaŭ ekskomunikitaj de la socio, kiam ili aŭdacas protesti kontraŭ la malpurigado de la aero; koncerne la fumantojn, ili mem prizorgas siajn proprajn kripligojn...

La tabako fariĝis la nova incenso, kaj tiel la institucioj pli bonfartas ol iam.

La fumantoj aĉetas cigaredojn aŭ tabakon, same kiel la pilgrimantoj kaj bigotoj aĉetas vakskandelojn. Sama procesio, samaj iluzioj, sama mistifiko.

La tabako ludas gravan rolon en la monda ekonomio, almenaŭ se oni konsideras la procenton de la enspezoj, kiujn ĝi ebligas al multaj ŝtatoj : Usono = 2,3 %, Francio = 4 %, Britio = 13 ĝis 14 %.

Milionoj da homoj vivas dank'al la tabako; sed, ankaŭ pro ĝi, milionoj suferas kaj mortas antaŭtempe.

Ĝenerale, oni konsideras nur la profitojn, sed ne la malŝparegojn ŝuldatajn al tiu amasmortiga politiko : 360.000 personoj mortas ĉiujare en Usono (preskaŭ 1000 personoj tage) pro la tabakismo; ĉu tio estas realisma politiko ? Ne tiom simpla estas la afero...

Preskaŭ ĉiuj landoj aĉetas tabakfoliojn prefere al finitaj produktoj, kiel cigaredoj, cigaroj aŭ piptabako, ĉar tio ebligas kompenson de "nesufiĉa" rikoltado, aŭ harmoniigon de la kvalito laŭ la gusto de la fumantoj

en la respektivaj landoj.

Usono, la ĉefa produktanto-eksportanto, eksportas ĉiujare 250.000 tunojn da tabakfolioj; ĝiaj ĉefaj klientoj en Eŭropo estas Britio kaj Okcidenta Germanio.

La tabakproduktado estas tre profitodona por kelkaj landoj; ekzemple por Grekio, Turkio kaj Bulgario, ĝi konstituas kvaronon el iliaj eksportaĵoj. Estas interese kompari la produktokvanton de kelkaj landoj, kaj noti la malsamecon de la politikaj reĝimoj kaj la fakton, ke la 4 unuaj posedas la atombombon. Tiuj ciferoj koncernas la jaron 1972 (laŭ Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj por la Nutrado kaj Agrikulturo - "F.A.O.").

| | | |
|---|---|---|
| Ĉinio...................... | 803.000 | tunoj |
| Usono...................... | 793.000 | " |
| Hindio..................... | 409.000 | " |
| Sovetio.................... | 300.000 | " |
| Brazilio................... | 255.000 | " |
| Turkio..................... | 173.000 | " |
| Japanio.................... | 142.000 | " |
| Koreio..................... | 94.000 | " |
| Pakistano.................. | 87.000 | " |

Se temas pri finitaj produktoj, la ordo estas malsimila (cigaredoj, 1972):

| | | |
|---|---|---|
| Usono............. | 599.000.000.000 | cigaredoj |
| Sovetio........... | 348.000.000.000 | " |
| Japanio........... | 256.000.000.000 | " |
| Britio............ | 152.000.000.000 | " |
| Okcidenta Germanio | 131.000.000.000 | " |
| Pollando.......... | 84.000.000.000 | " |
| Brazilio.......... | 83.000.000.000 | " |
| Francio........... | 72.000.000.000 | " |
| Italio............ | 68.000.000.000 | " |
| Hindio............ | 62.000.000.000 | " |

En la periodo 1967/1970 la jara mondproduktado atingis 47.500.000 kvintalojn da sekigitaj tabakfolioj. Nur en Francio, kiu produktas 1 % el tiu totalo, 21.000 hektaroj da bona grundo estas uzataj por rikolti tiun avidan sanfuŝan planton.

Rapida kresko de la afrika produktado montras, ke la frenezeco etendiĝas al kontinento, kiu havas pli urĝajn

bezonojn. En la unua vico troviĝas lando regata de rasistaj blankuloj : Rodezio (1,5 % el la mondproduktado).

Eble la problemo pri malsato en la Tria Mondo estas ankaŭ "falsa problemo"...

## A V I D A P L A N T O

Multaj ŝtatoj favoras la kultivadon de planto tre postulema rilate sian prizorgadon, kaj responsas pri la morto de multaj homoj, dum aliaj homoj amase mortas pro manko de nutraĵoj.

La tabako povas kreski sub tre diversaj latitudoj; ĝi havas grandan adaptiĝemon koncerne la klimaton kaj la grundon. Sed ĝi bezonas atenton kaj montriĝas kiel unu el la plej avidaj plantoj; ĝia kulturo estas tre delikata.

141 gramoj da azota sterkaĵo (kreskelemento) sufiĉas en unu hektaro kaj dum unu tago por la tritiko, sed por la tabako necesas 1086 g.

Se temas pri potaso (kalia karbonato, nutradelemento; ludas rolon ankaŭ en la konsumiĝo), ni havas :

| | | |
|---|---|---|
| tritiko | : | 74 g. |
| tabako | : | 1800 g. |

Kvankam la kalko ne estas tiom necesa, la tabako absorbas da ĝi tre grandan kvanton : 1476 g. (tritiko 29g, terpomo 137 g).

Koncerne fosfidon (t.e. fosfida acido, kresk- kaj maturiĝelemento) :

| | | |
|---|---|---|
| tabako | : | 235 g. |
| terpomo | : | 203 g. |
| tritiko | : | 59 g. |

Estas malkonsilinde uzi sterkaĵojn, kiuj entenas kloron (kainito, silvino, potasklorido, ktp) pro la fakto, ke ĉi tiu elemento malhelpas la sekiĝon, la konservadon kaj eĉ la konsumiĝon de la tabako.

Inter la malamikoj de la tabakplanto troviĝas la talpo, la talpo-grilo, la limakoj, la flavaj kaj grizaj vermoj, la afidoj.

Ankaŭ la vetero povas damaĝi la rikoltojn : frosto, sekeco, ekscesa humideco, kaj ĉefe hajlo.

Kun la melduo (Peronospora tabacina), la nigra putrado de la radikoj (Thielaviopsis basicola) estas la plej

danĝera malsano de la tabako. Kontraŭ la melduo oni uzas fungicidojn, kiel manebon (ĉefe en Francio) aŭ zinebon. Notinde estas, ke la manebo estas kancerogena kaj la S.E.I.T.A. antaŭvidas malpermesi ĝian uzon por la eksportotaj tabakoj !

Ekzistas ankaŭ bakteriaj malsanoj : bakteria velkiĝo, foliaj makuloj, virusaj malsanoj kaj parazitaj plantoj (orobanko).

Post la rikolto ekestas novaj minacoj : fungoj kaj ŝimo (pro humideco). Poste aperas insektoj : lasiodermo (Lasioderma serricorne) kaj malgranda lepidoptero : Esphestia elutella, kiuj vivas eĉ en la enpakita tabako. Por eviti tion, kemiaĵoj estas ankoraŭ necesaj : cianida acido, etilenoksido, lindano, herkolo.

Ne estas utile tedi la leganton per nocioj pri la tabakkulturo kaj ĝiaj malhelaj flankoj, tamen estas bone havi ideon pri tio, ĉar la portabaka reklamo neniam informos la publikon alimaniere ol ĝi faras nun.

Necesas ankaŭ aldoni, ke inter la plej bezonataj sterkaĵoj troviĝas la azotaj, kaj ĝuste, laŭ usonaj sciencistoj, azoto ludas gravan rolon en la formiĝo de nitrito, kiu estas tre kancerogena.

## K A N C E R O kaj I N F A R K T O

Jam en la 19-a jarcento, oni suspektis la tabakon, kiel faktoron de kancero. En Montpeliero, Francio, D-ro Bouisson konstatis, ke el 68 personoj malsanaj pro buŝkancero, 66 fumis la pipon kaj unu alia maĉis la tabakon.

En 1936, du kirurgoj el Nov-Orleano, Usono, rimarkis, ke preskaŭ ĉiuj bronkopulmaj kanceruloj, kiujn ili operaciis, estis cigaredfumantoj.

De 1950 ĝis 1960, la procento de mortoj pro pulmokancero plialtiĝis en Francio je 130 % por la viroj kaj 30% por la virinoj.

El 100 viktimoj de la pulmokancero troviĝas 94 fumantoj. El 20.000 personoj, kiuj mortas ĉiujare pro tabakismo en Francio, troviĝas 12.000 pro la nura pulmokancero.

El cent personoj 20-jaraj, kiuj fumas tage 20 cigaredojn, 5 % mortos antaŭ la 60-jariĝo pro pulmokancero, sen kalkuli la riskojn pri laring-, buŝ-, ezofag- aŭ vezik-

kanceroj, la kardiovaskulajn malsanojn kaj la arteriiton, la kronikan bronkiton (7% el la mortoj kaj invalidiĝoj).

Prave, P-ro Lenègre deklaris :

"En Francio, la tabako mortigas ĉiujare 20.000 personojn. Ĝi estas pli danĝera ol la pesto kaj la ĥolero."

Necesas aldoni, ke laŭ la statistikoj la Francoj "ne multe" fumas : 1990 g en la jaro (Nederlandanoj 2920 g, Usonanoj 2870, Belgoj kaj Luksemburganoj 2660, okc.Germanoj 2410, Japanoj 1940, Britoj 1930...)

## K I A M M U R D I S T O fariĝas A L M O Z U L O

En Francio okazis grava kampanjo por ebligi lukton kontraŭ la kancero. La Ministerio por Publika Sano lanĉis alvokojn, petante la civitanojn, ke ili donacu monon por la esplorlaboroj pri kancero.

La argumentoj montris mirindan bonkorecon; la franca ŝtato aspektis zorgema koncerne la sanon de la homoj pri kiuj ĝi respondecas. Multaj maljunuloj estis kortuŝitaj kaj donis por la avida monstro parton el siaj ŝparaĵoj, tiel ke, malrekte kaj malgraŭvole, ili ebligis al la ŝtato daŭrigi sian elprovadon de atombomboj. Sed regis kompleta silento pri la tabakismo, la ĉefa kaŭzo de gravaj kanceroj.

Fakte, la ŝtato volas gajni je ambaŭ flankoj : enkasigi la taksojn (4% el la enspezoj) kaj ne pagi por la esplorlaboroj. Tiel estas ! Ne mirige, ke oni vidas tiom da reklamo, tiom da afiŝoj, kiuj vantas la "plezurojn" de la fumado kaj la ecojn de la fumanto !

La plej aĉa argumento favore al tabako estas tutcerte tiu, laŭ kiu multaj homoj havigas al si vivrimedojn dank' al ĝia kulturo, prilaborado kaj vendado. La ŝtatoj donas laboron al la homoj, sed ĉu ili kalkulas kiom da laborhoroj estas perdataj pro longedaŭraj malsanoj ? Ĉu ili kalkulas kiom da malŝparoj okazigas la tabakismo : restado en hospitaloj, plagoj ligitaj al la tabakismo, kiel narkotismo, invalidiĝoj, alkoholismo, incendioj, ktp ? Kaj ĉu, finfine, morto de 20.000 homoj estas preferinda al senlaboreco de 20.000 aliaj ?

...

# B R E Ĉ O
## en la O R G A N I S M A D E F E N D S I S T E M O

Statistikoj montras, ke la nombro da labortagoj perditaj pro malsano estas 20% pli alta ĉe la fumantoj.

La esplorlaboroj de du Aŭstralianoj, D-ro Keast kaj P.Holt, estas tiurilate tre interesaj, ĉar ili montras almenaŭ unu el la kialoj de tiu pli ofta malsaniĝo. Ili konstatis, ke la fumado malaltigas la defendokapablon de la organismo kontraŭ infektadoj (1).

La organismo defendas sin per du sistemoj :

Unue, la polveroj kaj mikroboj algluiĝas al muko, kiun sekrecias la bronkoj. Tiam, vibraj cilioj eligas la malpuran mukon ĝis la malantaŭa parto de la buŝo; tio estigas bezonon kraĉi aŭ enstomakigi tiun miksaĵon. En la lasta kazo, la acidoj de la stomako detruas la mikrobojn.

La dua defendosistemo konsistas el blankaj globuloj (leŭkocitoj). De ili ekzistas du kategorioj : la granulocitoj kaj la limfocitoj. La unuaj eltendas elkreskaĵojn por kapti kaj engluti la mikrobojn aŭ polverojn. De la duaj ekzistas ankaŭ du kategorioj : la "limfocitoj B" kaj la "limfocitoj T". La limfocitoj B sekrecias antiksenon (antikorpon) per kiu ili rekte atakas kaj senpovigas la mikrobojn. La limfocitoj T ne produktas tian sekrecion, sed sieĝas la "fremdan korpon" por ĝin detrui. Ili rolas ĉefe kontraŭ la virusoj, kanceraj tumoroj, kaj ankaŭ en la forĵeto de greftitaj organoj.

Ambaŭ aŭstraliaj sciencistoj rimarkis, ke la granulocitoj bone eltenas la tabakfumon. Male, la limfocitoj B ne plu kapablas sekrecii antiksenon, kaj la limfocitoj T perdas sian defendkapablon, kaj tiel la plej grava parto el ambaŭ limfocitoj estas ekstermita.

La ĉefaj responsuloj de tiu fenomeno estas la karbona dioksido (CO) kaj la azota dioksido (NO), kontraŭ kiuj la filtriloj estas tute senefikaj.

Ankaŭ la ruĝaj globuloj (hematioj) renkontas malfacilojn por plenumi sian rolon. La hemoglobino de la ruĝaj

---

(1) Laŭ "Science et Vie", junio 1974.

globuloj, kiu fiksas karbonan dioksidon kaj oksigenon, por ilin transporti tra la organismo, saturiĝas pro la karbona dioksido entenata en la fumo; la procento de satureco povas atingi 10% por la fumantoj, dum ĝi ne superas 2% por nefumantoj (aŭ personoj, kiuj ne enspiras enfumitan aeron).

Plie, la fumo inhibicias la cilian funkcion de la bronkoj, tiel ke la mikroboj, nocaj substancoj kaj polveroj eniras la pulmajn alveolojn preskaŭ sen malhelpoj, nek obstakloj.

## EFIKO SUFIĈE MALRAPIDA POR PERFEKTA KRIMO.

La tabako estas unu el la plej kompleksaj plantoj rilate sian kemian konsiston. Ĝi entenas alkaloidojn, interalie kaj ĉefe la nikotinon (1 ĝis 3 mg en ĉiu cigaredo), kiu estas tre toksa substanco. Unuanura guto injektita en homa organismo estigas tujan morton; ĝia enstomakigo en tre malgranda kvanto kaŭzas kapturniĝojn, naŭzojn, malvarman ŝvitadon, lakson, ktp; ĝia efiko kontraŭas tiun de la vitamino C, kaj oni uzas ĝin en la fabrikado de insekticidoj. Estas ankaŭ la nornikotino ($C_9 H_{12} N_2$) kaj la anabazino ($C_{10} H_{14} N_2$) foje eĉ en pli granda kvanto ol la nikotino mem en kelkaj tabakspecoj.

Sed tiuj alkaloidoj estas nur 3 el la 200 jam malkovritaj en la tabako !

Troviĝas ankaŭ gudroj (14 ĝis 34 mg en ĉiu cigaredo), kiuj povas transformiĝi en hidrokarbidojn, inter kiuj multaj estas koncerogenaj; aldehidoj : furfurelo (epilepsiogena) kaj kolidino (mortiga toksaĵo je altaj dozoj); steroloj, kiuj fariĝas kancerogenaj pro la kemia transformiĝo ŝuldata al la varmego; alkoholoj, kinonoj, acidoj (cianacido), fenoloj, glucidoj, aminaj acidoj, proteinoj, esteroj, kloridoj kaj iodidoj, arseniko, karbona dioksido (CO), metaloj, inter kiuj : kadmio (po 1,5 mg en cigaredo; toksiĝo per kadmio povas esti kaŭzo de pulma enfizemo), nikelo, kalio 30, stroncio 90, plumbo 210 kaj polonio 210 (radioaktivaj, diverskvantaj laŭ geografiaj devenoj)... tio estas nur kelkaj substancoj aŭ korpoj el la 1200 ĝis nun malkovritaj en la tabako,

kaj el kiuj 170 estas kancerogenaj.

Prof. Edward E.Martell konstatis, ke la alfa- kaj beta-radioj estas nete pli gravaj en la proksimeco de tabakkampo ol en tiu de luzern-, aven- aŭ maniok-kampoj, kaj ke la radioaktiveco de la tabakfolioj estas 30-oble pli granda ol la meza radioaktiveco de la entuta planto. Tio ŝuldiĝas al la fakto, ke la folioj estas kovritaj per cilioj (300 ĝis 900 en cm2 laŭ la specioj). En ĉiu cilio troviĝas glando bananta en viskoza substanco, kiu kaptas la radioaktivajn elementojn, faligitajn de la pluvo.

Je 600 C-gradoj (konsumiĝtemperaturo de cigaredo), la polonio fariĝas gaso, kaj tiel eniras la spirvojojn. Ĝiaj eroj akumuliĝas kaj definitive fiksiĝas sur la epitelion de la bronkoj.

Eĉ kiam la gudroj jam de longe malaperis el la organismo, la radioaktivaj eroj daŭre radias kaj vekas la kancerogenajn virusojn troviĝantajn en la ĉeloj. Tiuj virusoj kaŭzas malordon en la genera sistemo de la ĉeloj, kiuj, tiam, dividiĝas tute senorde.

"La risko pri pulmaj kanceroj estas tre serioza, ĉar la periodo de duonvivo de la plumbo 210 kaj de la polonio 210 estas respektive 25 kaj 22 jaroj" (Prof.Ducassou, Laboratoire d'Exploration fonctionnelle de l'Université de Bordeaux). Tio signifas, ke post respektive 25 kaj 22 jaroj, la plumbo 210 kaj la polonio 210 konservas la duonon de sia radioaktiveco. Tial, eĉ malgranda kvanto de plumbo 210 kaj polonio 210 sufiĉas por estigi kanceron ĉe personoj jam delonge rezignintaj pri fumado.

## L A T A B A K R E K L A M O ...

### Kial ne opio ?

Drasta reglamentado kaj eĉ malpermeso de la tabakreklamo estas nepre necesaj. Tiu reklamo estas nenio alia ol senrespondeco kaj sinmortigo; ĝi estas malrekta krimo.

Kompreneble, neniu marko invitas al ekscesa fumado; ekzemple, tia reklamo ne ekzistas : "Fumu 60 cigaredojn tage kaj via vivo transformiĝos", sed ankaŭ ne : "Fumu nur unu cigaredon tage, sed cigaredon X". La argumento,

laŭ kiu neniu homo estas devigata fumi, estas hipokrita. Psikologoj tro bone scias, kiom ofta ripetado de iu ajn sugesto povas influi homon; nur la tempo necesa por tiu influo varias laŭ la homoj.

Reklamo konsistas el kiel eble plej efika - plej racia - ekspluatado de la emoj kaj malvirtoj de la homo, do de ĝiaj plej malraciaj reagoj aŭ inklinoj; por atingi tiun celon, ĝi nepre devas ŝanceli la volon, instigi al malracia sinteno, flati, trompi, estigi novajn bezonojn, ebligi novan mensostaton aŭ vivstilon, veki absurdajn sentojn, kredigante, ke ili estas tiuj de modernaj, liberaj, emancipiĝintaj homoj.

Multe pli grava estas la efiko de tiu reklamo sur infanan publikon; tio estas perfido kontraŭ la junularo. Infano kaj adoleskanto nature imitas la plenkreskulojn; per tiu imitado ili imagas sin pli adoltaj, pli maturaj.

Multaj homoj komencis fumi pro imitspirito. De la admirata persono, ili kredis tiel akiri la personecon kaj ecojn, sed tio estas finfine nur pruntpersoneco. Ili estas subproduktoj de la kinbildoj kaj de la televidelsendoj, de la magazinoj. Ili estas la iluziigitaj viktimoj de fikomercistoj.

Kiom ridindaj estas la ĵurnaloj, kiuj titolas "Ankoraŭ unu viktimo de la narkotismo", dum grandaj afiŝoj kaj plenaj paĝoj de tabakreklamo devus instigi ilin al redakto de tute aliaj titoloj : Dank'al la portabaka reklamo kaj la mono, kiun ni enspezas per ĝi, ni povas informi vin pri la narkotismo kaj ĝiaj viktimoj.... sed la mono tiel gajnita devigas nin silenti pri alia formo de narkotismo : la nikotinismo.

"Ĉu estas juste, ĉu estas racie mobilizi niajn policistojn aŭ eĉ rekruti pliajn por savi el haŝiŝo, kifo aŭ marihuano la patrujon endanĝerigitan, dum la sama ŝtato instigas kiel eble plej al konsumado de siaj kancerogenaj cigaredoj, kaj sur la ondoj de ĉiuj radiostacioj de Francio toleras ĉiutagajn instigojn al konsumado de kreskanta kvanto da brando kaj tabako ?" (Prof. T. Monod)

## La KONTRAŬREKLAMO EKAPERAS

La raportoj de multaj sciencistoj, kuracistoj, kirurgoj kaj aliaj specialistoj pri medicino estigis tamen ĝis nun pozitivajn reagojn flanke de kel-

kaj registaroj.

Interesa iniciato venis el Britio, kie la registaro publikigis en la grava semajnrevuo "News of the World" tabelon kun la titolo "Elektu vian venenon !". Ĝi priskribas la ĉefajn cigaredmarkojn haveblajn en Eŭropo, kaj la kvanton da gudro kaj nikotino, kiujn ili enhavas.

Ankaŭ la finna ŝtato ekagas por helpi tiujn, kiuj volas liberigi sin el la fummanio; ĝi disponigas diapozitivojn kaj filmojn al la centroj de la nacia organizo por la sano. Kaj jen alia eĥo el la nordo :

"La reklamo por la tabako estos malpermesata en Norvegio ekde la 1-a de julio venonta, sekve de decido alprenita vendrede far la registaro." ("Ouest-France", 28-an de okt.1974).

Ekde la 1-a de januaro 1971, la reklamo por la cigaredoj estas malpermesata ĉe la usonaj radio kaj televido sed, strange, oni akceptas ĝin por la cigaretoj (malgrandaj cigaroj) ! Tamen tio estas bona komenco.

Notinde ankaŭ estas, ke la kvantoj da nikotino, kiujn enhavas la cigaredoj devas esti presitaj sur la pakoj, same kiel la mencio : "Tiu cigaredo estas danĝera por via sano". Sed tiu obstaklo ne ĝenas konsiderinde la fabrikantojn, ĉar ili povas aperigi tiujn indikojn sur la flanko de la pako per literoj maldikaj kaj preskaŭ samkoloraj, kiel la pakpapero, tiel ke ili fariĝas apenaŭ rimarkeblaj kaj legeblaj. Plie, la ĝenerale bela kaj alloga aspekto de la pakoj forgesigas la entenatan venenon.

Malgraŭ tio la situacio nur provizore pliboniĝis :

"La usona ministerio por la sano maltrankviliĝas : la intensa kontraŭtabaka kampanjo kondukita de 10 jaroj ne fruktodonis, la devigaj avertoj pri la danĝeroj de la tabako indikitaj sur ĉiu cigaredpako, la malpermeso de la cigaredreklamo ĉe la televido ne efikis : la nombro de cigaredoj fumitaj progresas laŭ konstanta meznombro : de 480 miliardoj en la jaro 1960 ĝi atingis 580, malgraŭ du defaloj en 1964 kaj 1969. Intertempe la American Cancer Society publikigas statistikojn : la procento de pulmokanceroj altiĝis je pli ol 150 % depost 1950." (Laŭ "Science et Vie", marto 1974).

...

## KONTESTI AŬ MALPERMESI ?

Tre konata estas la agado de Ralph Nader kontraŭ la trompa reklamo, la senutilaj varoj, la falsaj etiketoj, la konstruado de nesekuraj aŭtomobiloj, ktp. Dum unu el liaj prelegoj en Francio, Maurice Estingoy, membro de la Instituto, diris :

"Estas netolereble vidi cigaredmarkojn prezenti argumentojn, kiuj estas kontraŭaj al tio, kion asertas jam delonge la plej grandaj specialistoj pri toksologio. La interparoloj de Bichat precipe demonstris plian fojon la danĝerojn de la cigaredo por la junuloj. Ne estas koncepteble, ke la Franca Regio de la Tabakoj permesas al si diri "la vivo estas batalo; gajnu tiun batalon fumante cigaredon 'Française'.

Oni nepre apliku la rimedojn, kiuj estas necesaj, kaj imitu la ekzemplon de Usono, kie oni finfine atingis severan reglamentadon."

Alia Usonano, John Banzhaf, fariĝis fondinto kaj direktoro de organizo, kiu celas defendi la rajtojn de la nefumantoj. En la jaro 1966, dum li rigardis futbalmaĉon ĉe la televidaparato, li rimarkis reklamon por cigaredoj. Tiam advokato en jura kabineto de Nov-Jorko, li ekpensis, ke ekzistas leĝo nomita "Justeca Doktrino" (Fairness Doctrine), kiu estas aplikebla, kiam grava publika afero priparolita ĉe la anteno estigas kontraŭdirojn; tiu leĝo devigas la radio- kaj televid-staciojn konsenti egalan tempon al la kontraŭdiranto; sed ĝis tiam oni aplikis ĝin nur por politikaj aferoj. Resume, tio estas rebat-rajto.

Banzhaf faris demandon kaj, surprizite, eksciis pri konsento. Kaj de tiam la Usonanoj povis vidi mirindajn anoncojn pri la cigaredoj... sed ankaŭ la malbonon, kiun ili faras al la homa organismo.

Poste, en 1971, sekve de la raporto de la Ĝenerala Kirurgo (Surgeon General) pri la danĝeroj de la tabakismo, la reklamo por la cigaredoj estis malpermesata ĉe la radio kaj televido, kaj, kompreneble, ĝia kontestado ne plu estis ebla.

Sed por Banzhaf tio ne sufiĉis. Li volis respektigi la rajtojn de la nefumantoj en publikaj lokoj : kolektivaj transportrimedoj, spektaklejoj, restoracioj, atend-

ejoj, oficejoj, ktp.

En tio helpis lin la publikigo de la Raporto farita de la Ĝenerala Kirurgo por la jaro 1972, en kiu estis evidentigitaj la danĝeroj de la tabakismo ankaŭ por la nefumantoj ("pasivaj fumantoj").

Banzhaf sin turnis al aviadkompanioj; multaj el ili montriĝis tre favoraj kaj aplikis novan reglamentadon rilate la fumadon en aviadiloj. Li intervenis ankaŭ ĉe la fervojaj kaj busaj kompanioj, sed kun iom malpli da sukceso, precipe ĉe la lastaj; al la asekurkompanioj li proponis, ke oni apliku specialajn tarifojn por la fumantoj, aŭ ke oni konsentu rabatojn por la nefumantoj, ĉar multajn incendiojn oni ŝuldas al la fumantoj, kaj la nefumantoj estas ĝenerale pli bonstataj koncerne la sanon.

Ĉu oni devus ankaŭ malpermesi la fumadon antaŭ la kameraoj de la televido al ĉiuj parolistoj, ĉiuj intervjuantoj kaj intervjuatoj kaj dum ĉiuj debatoj ? Eble tio estus bona ekzemplo. Sed nura malpermeso estas nepopulara kaj pro tio ne efektivigebla; ĝi eĉ povas instigi al malobeo - precipe la adoleskantojn kaj infanojn - ĉar tiam ĝi aspektas kiel kontraŭstarinda obstaklo, kiel primokinda regulo. Male, la kontestado malfermas la pordon al ekkonsciiĝo de la amasoj, tiel ke la tabako perdas sian originan esprimvaloron : ĝi ne plu estas tiu ilo en kiu oni provas ĉerpi memfidon, sed nur oldula plezuro.

Ĉu la disŝirado de afiŝoj, kiuj instigas al konsumado de tabako, ne estus finfine formo de "helpo al endanĝerigitaj personoj" ? Ĉu oni ne kulpas, kiam oni lasas tiajn afiŝojn en bona stato ?

Per iom da cerbumado, estas eble - kaj foje eĉ amuze - kontraŭstari tian reklamon. Oni povas de tempo al tempo legi kontraŭsloganojn, kiujn lertaj manoj skribis sur tiaj afiŝoj. Verdire, ne nur la nefumantoj povus partopreni en tiu batalo, ĉar ĝi koncernas ankaŭ la fumantojn, ĉar nur ilin la tabakreklamo primokas, des pli bone, ke ili mem pagas tiun reklamon.

...

## TABAKISMO kaj LINGVO

Kvankam la tabakismo ekzistis jam delonge en Eŭropo, ĝia disvastiĝo konsiderinde kreskis depost la dua mondmilito. Usonaj soldatoj disdonis cigaredojn, la kinarto prezentis ĉefe usonajn filmojn, kies herooj fumas. Rekte aŭ ne rekte, la personeco de la preferata aktoro-heroo influis multajn adoleskantojn; ĝi lasis spurojn en la subkonscio de infanoj, kaj pli allogis ilin ol la "ripetaĉema avo, kiu militis dum la jaroj 1914-1918", kaj kiu trovis konsolon en la tranĉeoj dank' al la tabako, tiu suno de la por-kanona karno. La plej simpla maniero havigi al si iom el tiu admirata personeco konsistis en imitado de la gestoj, kiujn faris la aktoro-heroo; la plej evidenta estis la fumado de cigaredoj, prefere usonaj.

La angla lingvo trovis bonan reklamfonon sur la cigaredpakoj kaj samtempe la anglaj kaj ĉefe usonaj cigaredoj plifortigis la prestiĝon de la angla lingvo en la junaj cerboj. La junuloj pli volonte aĉetis markojn kun fremda nomo - identiĝanta kun la venkinto, la kinherooj - kies prononco estis stranga por multaj plenkreskuloj. La grandskala tabakismo kaj la angla lingvo disvastiĝis samtempe, sin subtenante reciproke.

## TABUO

Dum la tabakismo mortigas pli da homoj ol la trafikakcidentoj (preskaŭ 7-oble en Usono),

- dum la Reĝa Akademio pri Medicino de Britio deklaris, ke :
  "La trouzo de cigaredoj estas same mortiga, kiel estis la grandaj epidemiaj malsanoj, kiaj tifoido, ĥolero kaj tuberkulozo, kiuj trafis la antaŭajn generaciojn de nia lando",
- dum en okcidenta Eŭropo, ĉiuj tifoidaj epidemioj ne mortigis pli da homoj, de la 16-a jarcento ĝis nun, ol la cigaredoj en Usono en unu jaro,
- dum en Danio, alta funkciulo de la publika Saneco deklaris :
  "Ni estas ĉe la rando de unu el la plej grandaj katastrofoj de la medicin-historio",

- dum la Internacia Kongreso de Moskvo (1968) konkludis siajn laborojn per la jenaj vortoj :
  "La cigaredo devas esti konsiderata kiel unuaranga kancerogena faktoro."
- dum la Ĝenerala Kunveno de la Monda Organizo por la Saneco deklaris en la jaro 1970 :
  "La cigaredo estas mortigilo pri kiu neŭtraleco ne plu estas ebla."
- dum la Raporto de la Reĝa Kolegio de la Medicinistoj de Londono indikis en 1970 :
  "La trouzo de tabako responsas,ĉiujare pri la antaŭtempa morto de 20.000 homoj inter 35 kaj 65-jaraj en Britio."
- dum la Monda Organizo por la Sano asertas :
  "La lukto kontraŭ la fumkutimo povus pli efiki en la ekonomie progresintaj landoj por plibonigi la sanon kaj plilongigi la vivon, ol iu ajn alia rimedo de profilakta medicino."

... la francaj respondeculoj pri la Sano havas zorgojn pro la malemo de la Francoj koncerne... la vakcinadon!

Tutcerte fiaskus la kandidato al ŝtata prezidenteco, kiu aŭdacus prezenti sin antaŭ la baloto kun, interalie, kontraŭtabakisma programo. El timo rezultas tabuo.

Plie, la problemoj, kiujn estigus la realigo de drasta plano estus relative multnombraj, ĉar ankaŭ la fabrikantoj de pipoj, cigaredpapero, alumetoj, fajriloj, cindrujoj kaj diversaj akcesoraĵoj estas ligitaj, same kiel la produktantoj, prilaboristoj aŭ vendistoj de tabako,al politika sistemo por kiu parazitaj aktivecoj estas necesaj por malebligi - aŭ malfruigi - la emancipiĝon de la popolo. Estus iom naive kredi, ke la ŝtatrespondeculoj ne konscias pri la fakto, ke la tabakismo estas finfine ruiniga; sed per ĝi la ŝtato enkasigas monon, kaj sufiĉas aldoni pliajn impostojn por ripari aŭ kompensi la damaĝojn.

Ne mirige, ke dum Francio regis en Hindoĉinio, la papavkulturo estis kuraĝigita same de la Kortego de Anamo, kiel de la protektorata registaro. Laŭ "Le Courrier du Vietnam" (jan. 1974), 5000 opio-vendejoj kaj -fumejoj estis instalitaj en la tuta Hindoĉinio sub la protektado de Guberniestro Paŭlo Doumer. De 1898 ĝis 1925, ili kon-

tribuis por kvarono en la jarbuĝeto de Hindoĉinio.

La malproksimeco ebligis tion. Kvazaŭ ekzistus hierarkio ankaŭ en la malestimo, ĉar tia politiko estintus neebla en la metropolo mem.

Multaj fumantoj ne povas memliberiĝi de la tabakismo kaj plie, la reklamo, jen malkaŝa, jen insida, kaj la premanta influo de la socia medio ne donas al ili la emon frakasi tiun sklavecon.

Tiel, fumado fariĝis tute konformisma, amasa, religieca kaj ŝafa inklino. La sankta odoro de la tabako anstataŭis tiun de la incenso, kaj same el la fumo de la unua, kiel de la dua, fontas la tabuoj.

## TABAKISMO kaj SINDIKATISMO

La sindikatistoj batalis kaj batalas por respektigi la rajtojn de la laboristoj, havigi al ili pli bonajn vivkondiĉojn kaj aplikigi pli sekurajn laborkondiĉojn.

Ankaŭ la lukto kontraŭ la tabakismo koncernas ilin.

Estas malfacile postuli de la registaro pli bonan sanpolitikon, pli sekurajn, pli agrablajn, pli bone aerumitajn, sunumitajn aŭ klimatizitajn laborejojn, se la laboristoj mem fuŝas per tabakfumo sian sanon kaj la aeron, kiun ili enspiras.

Kunveni en fumoplena salono por debati pri la kontraŭsocia politiko de la registaro, aŭ pri la fuŝado de la vivmedio far grandaj parazitaj entreprenoj, tio estas bela ekzemplo de senkonsekvenco.

Necesas ankaŭ konsideri la liberecon de la nefumantoj. La aero estas ĉies propraĵo; la demokrateco postulas minimume, ke ĝin oni ne malpurigu.

La sindikatoj ne alproprigu al si tiun reĝepokan devizon de kelkaj fumantoj : "Ĉar tio estas mia bonplezuro". La rajto de la nefumantoj havas prioritaton; la sano de ĉiuj pli gravas ol la stereotipa plezuro de kelkaj. Tio estas demando pri edukado de la laboristoj far la sindikatoj mem. Ĉiu alia sinteno povas konduki nur al demagogio; kaj ĉio, kion oni akiras unuflanke per demagogio, nepre perdiĝas aliflanke.

# NORMALIGO

"La tabako detruas la korpon, atakas la inteligentecon kaj brutigas la naciojn."
(Honoré de Balzac)

Ni ja scias, ke la "normaligo" ekzistas sur la politika tereno, kio ne signifas, ke la normaligantoj estas devige pli normalaj ol la normaligitoj mem. Ankaŭ la tabakismon oni povas konsideri kiel normaligon de la homo laŭ la leĝoj de la konsumsocio. Fumanto estas normaligita konsumanto. Sed ĉu normala homo ?

Interesan rimarkigon faris Usonano, kvankam iom abrupte, kiu malakceptas la esprimon "nefumanto". Li diris, ke ĝi ne estas pli sencohava ol "nealkoholulo", "nenarkotisto" aŭ "neŝtelisto", kaj demandis, kial normalaj personoj devus nomi sin "ne-io", ĉar ekzistas malsanuloj, kiuj estas la fumantoj, kaj la aliaj !...

Multaj fumantoj iom konscias pri la stulteco de la tabakismo, sed tio ne sufiĉas por ke ili alprenu firman decidon. Tamen, la nereboniĝeblaj fumantoj konsistigas malgrandan parton el la tuta fumemularo; plej ofte la tabakbezono estas supraĵa.

Tiu "rafinita plezuro" eniris la morojn. Ĝi eĉ atingis la junularon, kiu volonte - kaj foje prave - kritikas la oldularon, sed alprenas de ĝi ĝuste tion, kio estas plej ridinda.

Ĉu la regantaj klasoj povas estimi homojn, kiuj, blinde kaj ŝafe, adoptas kutimon, ĉar la plimulto ĝin adoptis? Ĉu tiu mensostato ne antaŭvidigas la gregan instinkton, kiu disvastiĝas dum la internaciaj streĉiĝoj, kiuj transformas homojn en kakiajn murdmaŝinojn ? Kion povas pensi la tenantoj de la "reganta ordo" antaŭ tia sinteno, se ne, ke "la brutaro bezonas fojnon, do ni kontentigu ĝin" ?

Eble, iam, la fumado povis esti esprimrimedo per kiu homoj elmontris sian ribelemon kontraŭ la socio, sian fantaziemon aŭ snobecon, sian kontraŭkonformismon, ktp.

Sed nuntempe estas vane kredi, ke fumado estas io originala, distinga, normala aŭ eĉ kuraĝa, ke ĝi atestas pri sukceso en la vivo, socia promocio, memfido de moderna homo, se ne, trampoj estus aŭskultindaj homoj !

Ne necesas fanfaroni pri tiu emo, dirante : "Ba! Ĉiel ni iam mortos !", kvazaŭ temus pri hazardludo, en kiu oni

ne antaùvidas, kiun trafos la revolverkuglo. Oni povas fieri, ŝerci, kiam oni havas sanon; oni povas fieri eble ankaù kelkajn sekundojn aù minutojn antaù la morto, sed ne antaù la diagnozo pri longedaùra, elĉerpiga, suferiga kaj senelira malsano. Oni povas ankaù diri: "Nur unu fojon ni vivas, do, ni ĝuu la vivon !". Fakte, la reklamo donas multajn ecojn al la tabako, tiom, ke la pura aero sendube ofendas la delikatan nazon de ĉiuj ĝuemaj kaj ĝuokapablaj homoj. Bildoj montras geamantojn en natura kadro, meze de arboj, sur plaĝo, aù kun montara fono; kion ili povas fari, se ne fabriki cigaredstumpon ? Se fajro estas nek en la koro, nek en la vejnoj, la fumo tamen pruvas, ke ĝi troviĝas ie !...

Montaigne (pr.Montenj; aùtoro de "Eseoj", 1553-1592) tutcerte malpravis, kiam li skribis :
"La amplezuroj estas laù mi la nuraj veraj plezuroj de la korpa vivo."

... almenaù se kredinda estas la tabakreklamo.

En franca lingvo, "cigarette" (cigaredo) havas inan genron kaj fumantoj volonte trovas en ĝi "amikinon"; sed tiu amikino estas same fidinda, kiel gonokokbredistino...

La surprizo alvenas poste !

## TABAKO kaj VIRINA EMANCIPIĜO

Eĉ kiam simio penas imiti homon, ĝi tamen ne fariĝas homo. Kiam virino simias viron, mankas multege al ŝi por esti viro, sed ankaù por esti virineca.

Dum longa tempo, la fumado estis vira "privilegio". Tiam, la viro havis situacion, salajron, ekŝcesajn rajtojn, tiel, ke malforteco, senpoveco, sed ankaù praveco kaj inteligenteco ne havis decidigan rolon antaù stulteco. Estas do tute logike, ke la virinoj kaj infanoj adoptis tiun eksteran - sed ne malpli falsan - signon pri emancipiĝo kaj sendependiĝo.

Aliflanke, la kinarto, la televido kaj la reklamo neeviteble trafas malfortajn cerbojn. Multaj personoj fumas antaù la TV-kameraoj, dum interparoladoj, intervjuoj aù debatoj, kaj la sugesta forto de tiaj bildoj sufiĉas por impresi influeblan publikon. Tamen influeblo en si

mem ne estas malvirto aŭ indico pri malforteco; ĝi povas esti signo de inteligenteco kaj pruvi, ke la koncernato konscias pri neceso de ekvilibro kaj harmoniigo de siaj propraj ideoj kun alies ideoj, kiuj povas esti samvaloraj aŭ komplementaj.

Sed temas ĉi tie pri aparta mensostato.

Kelkaj psikologoj kaj psikanalizistoj opinias, ke la tabakismon oni ŝuldas al tro frua demamigo de la bebo; esplorlaboroj ankaŭ montris, ke la plimulto el la personoj, kiuj multe fumas iam estis polekssuĉema. La scivolemo kaj imitemo aldoniĝas al tio por plifortigi la vicojn de la fumantoj.

Ĉu ne ekzistas aliaj motivoj, pri kiuj eble jam parolis la psikanalizistoj, sed prezenteblaj laŭ pli klara maniero ? Kiam oni iom observas simiojn en zoologiaj parkoj, ne necesas multe da tempo por rimarki ilian ekshibiciemon. Ili bezonas okupi siajn fingrojn; eble ili imagas, ke la komenco kaj fino de l'mondo situas ie en la pubregiono. Tian sintenon la homoj ne havas - almenaŭ publike. Por okupi siajn manojn, ili bezonas palpeblan anstataŭigilon, longforman simbolon. Episkopa bastono, reĝa sceptro, marŝala bastono, Churchill-a cigarego, kaj - por la amasoj - cigaredo plenumas tiun rolon. Kelkaj virinoj trovas en ĝi kompenson al nepravigita malsupereccento ŝuldata al ilia naturo, kaj por multaj aliaj ĝi simbolas virinan emancipiĝon, socian kaj seksan liberiĝon. Vera emancipiĝo bezonas tamen multe pli ol emblemojn.

La virinoj, kiuj havas cigaredon ĉe la lipoj jam de la sepa aŭ oka matene - se ne pli frue - , kiuj eksterigas la fakton, ke ili fumas (precipe junulinoj) : alta aŭ fora pozicio de la cigaredo rilate la korpon, enspiro de fumo dum alvenas preterpasanto, inspiroplena mieno malantaŭ fumvolutoj, ktp), tiuj virinoj estas same observindaj, kiel la jam priskribitaj simioj, marŝaloj, episkopoj, ktp; sendube ili iam provis alpreni propran stilon antaŭ spegulo, por harmoniigi siajn gestojn kun sia personeco, ĉar la personeco estas ja grava afero en nia senpersoneciga epoko !

Bedaŭrinde, la simioj ne disponas spegulojn por ekkonscii pri sia personeco.

Aliajn aspektojn havas la tabakismo por la virinoj.

Per riskoj pri sterileco, abortaĵoj, perturboj de la menstrua ciklo kaj funkciado de la generaj organoj, nervaj malsanoj, eklampsio, malpli forta konstitucio de siaj infanoj, ktp, la virinoj pagas per multe pli da suferoj ol la viroj la konsekvencojn de sia senpripensemo.

Enketo farita en Anglio ĉe 17.000 infanoj montris kvarmonatan psikomotoran malfruon ĉe tiuj, kies patrino fumis. La patrina lakto enhavas nikotinon, kaj, plie, la aero, kiun enspiras la beboj estas malpura. Patrino kliniĝanta super lulilo, kun cigaredo ĉe la fingroj, se ne ĉe la lipoj, tio ne estas maloftaĵo. Eĉ inaj bestoj pli respektas siajn idojn. Kiom da personoj forgesas, ke nefumanto troviĝanta en fuma atmosfero enspiras en horo la saman fumkvanton, kiun li enspirus, se li mem fumus unu cigaredon ? En fermitaj lokoj la procento da karbona dioksido (CO) povas superi tiun, kiu determinas alarmon pro polucio en la grandaj urboj.

La nikotino akcelas la pulsoritmon de la koro (minimume 20 pliajn pulsojn en minuto) ĝis 20 minutoj post konsumiĝo de unu cigaredo. Ĉe gravedaj virinoj, ankaŭ la infano estas submetata al sama reĝimo. Tio estigas 10000 pliajn pulsojn en tago por multaj fumantoj.

Notinde estas, ke la fumado estas malpermesata en japanaj laborejoj, en ĉeesto de graveda virino.

Dum signoj de fiziologia maljuniĝo aperas antaŭtempe ĉe 3,7 % el la virinoj, kiuj ne fumas, tiu procento altiĝas je 45 % por la fumantinoj.

Se la virino, kiu estas biologie pli forta ol la viro, nuligas tiun avantaĝon pro virdevena manio, tio ne estas paŝo al vera emancipiĝo.

Ĉe virino iom zorgema pri sia eleganteco, distingiteco, beleco, ĉarmo, sano, aŭ eĉ simple pri sia natureco, freŝeco, libereco, for la iluziojn !...

La tabako estas ŝia plej perfida malamiko. Oni diras ŝerce, ke Eva perfidis Adamon per pomo. Per cigaredo Adamo venĝis sin. Depost la ĉastzono li ne eltrovis pli indan donacon por sia kunulino. Eltrovaĵo genia, ĉar ne trudita !

Estas pli agrable vidi virinon kun trajtoj malstreĉitaj, anstataŭ grimacantan kopion de kinstelulino aŭ subprodukton de la televidelsendoj. Estas pli interese trovi aŭtentikan virinon, kiu ne bezonas per multaj kosmetikoj

kompensi la damaĝojn, kiujn la fumo okazigas sur ŝian vizaĝkoloron. Estas pli emociige malkovri ĉe virino la freŝecon kaj naturecon, kiujn la konsumsocio ĉiam pli kaj pli forrabas el nia ĉirkaŭmedio, kaj aŭdi klaran voĉon ol matenan tusadon.

La virinoj povas postuli plenrajtecon sur ĉiuj terenoj de la socia vivo, sed ili povus - kun profito - rezigni pri la rajto je... stulteco.

"Laŭ mi, la tabako estas, kun alkoholo, la plej timinda kontraŭanto de la inteligenteco, sed nenio malgravigos ĝian trouzon; stultuloj estas la pli multnombraj, kaj la tabako povas nenion detrui en ili; ĉar ne la stultulojn vi prizorgas, provu konvinki la inteligentulojn". Aleksandro Dumas (filo), al Maurice de Feury.

Eble aliaj preferos tiujn parolojn de la sportistino Christine Wartel :

"Ĉiam memregi sin en ĉiuj okazoj sen serĉi memfidon en cigaredo, jen la plej bona ekvilibro tiel fizika, kiel mensa."

## E T B U R Ĝ A   M E N S O

Kiam ne svarmis la fumantoj, tiam ili estis pli ĝentilaj. Ili petis la permeson fumi, precipe en ĉeesto de virino; sed nuntempe grava procento de virinoj adoptis tiun stereotipan manion, kaj la fumantoj timas ridindigi sin per la demando : "Ĉu la fumo ĝenas vin ?".

Tial oni povas vidi, ekzemple 6 aŭ 8 fumantojn en 8-loka vagonkupeo, en kiu estas apenaŭ tolerebla la fumo de unu sola.

Malpuruloj alkutimiĝas al siaj korpaj odoraĉoj, bestoj al la odoro de siaj stalo kaj ekskrementoj, estas do tute nature, ke la fumantoj ne kapablas rimarki ĝis kia grado ili malpurigas la aeron.

Same kiel ekzistas burĝoj ne-sentemaj rilate la bezonojn, zorgojn aŭ suferojn de la popolo, tute same ekzistas fumantoj ne-sentemaj rilate la malemojn de siaj kunuloj.

Multaj nuntempaj burĝoj devenas el medio de "ordinaraj homoj", kaj el ĉi tiuj lastaj multaj primokas aŭ kritikas la burĝaron, kvankam ili kaŝe sopiras al tia "socia pro-

mocio". Ĝuste el tiaspecaj homoj konsistas grandparte la burĝaro. Ju pli malhoneste ĝi atingis tiun socian pozicion, des pli ĝi malestimas ĉion noblan, des pli mallarĝspirita ĝi estas.

Tiaj burĝoj neniam demandas al si : "Ĉu ĝenas la aliajn homojn, se mi ekspluatas ilin por certigi mian propran materian komforton ? Se por ĝui iom pli el la vivo mi iom neglektas iliajn rajtojn ? Se mi konsideras normale vivi kun pli da libero, ĉar mia situacio ebligas tion ?..."

Multaj fumantoj havas fakte saman sintenon, kaj se ili pretendas esti revoluciuloj, progresemuloj, demokratoj aŭ socialistoj, ilia sinteno jam montras kia estos ilia revolucio, progreso, demokrateco aŭ socialismo, ĉar ĝuste la ordinaraj gestoj ĉiutagaj esprimas multe pli ol belaj paroladoj.

## V I K T I M O J

Homoj ne povas daŭre elteni konsciencriproĉojn; la forto de l'kutimo venkas la sentemon. Tio naskas la bezonon pravigi sin kaj eksterigi signojn pri memstareco : Mi fumas ĉar mi bonvolas ! Mi fumas ĉar mi ŝatas tion !

La sento pri kulpeco ekzistas ĉe la narkotistoj, sed ne ĉe la fumantoj, ĉar la socio ricevas pri la unuaj malŝatindan bildon; ĉi tiuj sentas sin persekutataj, izolitaj. La montrofingroj celas ilin, ĉar la ŝtata beno ne iras ien ajn. Male, la fumantoj ĝuas tiun ŝtatan benon kaj la tabakismo tiom disvastiĝis, ke ili ne sentas sin pli izolitaj ol ŝafo meze de la grego. Plej ofte ili ne konscias, ke tabako entenas narkotaĵon nomitan nikotino, kies efiko estas komparebla kun tiu de multaj aliaj narkotaĵoj. Komence, la organismo pli malpli toleras tiun novan elementon kaj iom post iom adaptiĝas kaj finfine tiu alkutimiĝo kondukas al bezono; de tiam la organismo fariĝas pli postulema, tiom postulema, ke ĝi venkas la volon de la fumanto. Tio ne malhelpas, ke multaj fumantoj estas malpli toleremaj kontraŭ la narkotistoj ol la nefumantoj, kaj ili eĉ opinias, ke tio estas dekadencindico! Tre interesa por la sciencaj esplorlaboroj, la tabakplanto ebligas, pro sia rapida kreskado, siaj generaj ecoj, la eteco de sia grajno kaj aliaj karakterizoj, multajn stud-

ojn pri vegeta biologio, sed oni povas ankaŭ diri, ke la tabako, kiel prilaborita produkto, estas interesa por la esplorlaboroj koncernantaj la homon kaj ties medion : la socion.

En la moderna socio, multaj fortoj muelas la individuojn, drivigas ilin laŭ kapturnigaj fluoj kaj se multaj homoj kreas al si nur ŝajnidentecon, tio estas simptomo per kiu eblas analizi tiun socion. Nervaj streĉiĝoj pro atendado, laboro aŭ zorgoj, profesia vivo teda, monotona kaj senpersoneciga, reklamo kaj diversaj aliaj faktoroj aldoniĝas por perturbi la mensan ekvilibron kaj estigi novajn bezonojn. La tabakismo spegulas la socion, en kiu ni vivas; la nura malaperigo de la tabakismo ne plibonigus la socion, sed ĝi povus esti faktoro de pozitiva evoluo de tiu socio. Sed antaŭe necesas agnoski, ke la tabakismo ne estas fiziologia bezono; se ĝi fariĝas tia, la koncernato estas viktimo. Tiel ni trovas inter la fumemuloj multajn eminentajn, estimindajn, ŝatindajn personojn, kiuj fariĝis viktimoj de tiu manio.

## JUNULARO kaj TABAKISMO

Ŝajna memstareco, reala ekspluatado.

Tro ofte la junuloj sentas, ke la plenkreskuloj sintenas superece al ili, sed ne tiom bone rimarkas, kiam tiuj samaj plenkreskuloj ekspluatas ilin. Ili ne atentas, ke la virtoj estas ekspluateblaj samgrade kiel la malvirtoj kaj inverse, ke la manioj, modoj, emoj ankaŭ havigas monon al senskrupulaj homoj.

En la kapitalismaj landoj pli abundas trinkejoj ol kulturdomoj, ĉar la sociaj strukturoj baziĝas ĉefe sur kiel eble plej granda konsumado de varoj kaj sur formado de aĉetantoj-konsumantoj.

Tial la gejunuloj povas pli facile atingi aŭ eniri kafejon ol kulturdomon, kiam ili deziras kunveni, renkontiĝi, rendevui, revizii siajn taskojn aŭ relegi siajn lecionojn, paŭzi kaj sin distri.

La socio de la plenkreskuloj ne ŝatas vidi la junulojn vagi laŭ la stratoj, sed ĉu ĝi ĉiam klopodis ĝuste por ke la stratoj ne fariĝu la nuraj senpagaj akceptejoj por la junularo ? Ĉu ĝi proponis aktivaĵojn per kiuj la junuloj povus inteligente disvolvi siajn personecon kaj kapablojn,

anstataŭ konsumi ?

La tabakismo ĉe la junuloj kongruas kun tiu socia malsano; ĝi estas devojiĝo, je la profito de la konsumsocio, de la bezono aspekti memstara; ĝi anstataŭas la aŭtentikecon kaj la mensan ekvilibron per ŝablona gesto.

La tabakismo estas heredaĵo de olda socio, kiu ne sukcesis maturiĝi; ĝi montras la forton de l'kutimo kontraŭ la renoviĝkapablo kaj originaleco.

L I B E R I Ĝ O

Necesas unue, ke la fumantoj persvadiĝu, ke tabakismo estas kosta, sklaviga, sanfuŝa, danĝera por si mem kaj por la aliaj, malpura, ne estetika, ŝablona, ridinda kaj stulta manio, ke ĝi estas pli manio ol plezuro, ke ĝi estas indico pri nekompleta mensa maturiĝo kaj emancipiĝo, ke ĝi atestas nek pri socia promocio, nek pri sukcesoj en la vivo, nek pri vireco aŭ virineco, nek pri seksa sperteco aŭ liberiĝo, aŭ pri iu ajn alia kapablo.

Necesas, ke ili konvinkiĝu, proprarimede aŭ per dokumentoj (libroj, revuoj, diskoj aŭ filmoj, ktp), ke venki tiun emon, tio estas finfine liberigi sin el peza jugo.

Montriĝas, ke radikala decido estas pli efika ol timema senkonvinka rezigno. Pli bonaj rezultoj estis atingitaj post ekscesa saturiga fumado - ekz. unusemajna - ebliganta malagrablan sensaĵon.

Plej taŭgas la libertempoj aŭ eventuale la periodoj de resaniĝo por alpreno de tia decido. La fumanto diskonigu sian intencon al siaj konatoj kaj ĉefe al fidindaj personoj, kiuj povos lin subteni; kiam tio estas ebla, li alprenu tiun decidon komune kun laborkolegoj aŭ familianoj. Dum tiu malfacila periodo, estas rekomendinde eviti ĉiujn okazaĵojn, kiuj povus reveki tiun emon. Ankaŭ bona spirado, sana nutrado, kontentiga dormo, duŝoj, aktiveco : brikolado, ĝardenkulturo, sporto, marŝado, k.a. kontribuas al sukceso.

Oni ne tro fidu la "miraklajn" rimedojn, kiuj pretendas malaperigi tiun emon sen iu ajn volstrebo. Kelkaj rimedoj certe povas helpi, sed estus naive kredi, ke ĉio ŝuldiĝas al speco de magio. La fummanio, kiam ĝi estas

tro profunde enradikiĝinta, ne povas tiel facile malaperi. Multaj fumantoj suferas pro tiu sklaviĝo. Ilia organismo postulas sian kutiman nikotinkvanton, kaj ili sentas sin kvazaŭ nudaj, se ili ne havas cigaredon aŭ pipon ĉe la fingroj aŭ la buŝo.

Inter la proponitaj rimedoj estas :

- elektroskuoj
- bombonoj, kiuj enhavas diversajn substancojn : kinonon, lobelinon aŭ eĉ nikotinon (grada kvanta malkresko)
- cigaredoj sen tabako, faritaj per aliaj folioj ol tiuj de la tabako, aŭ eĉ rozpetaloj parfumitaj per mielo...

Pluraj markoj vendas sennikotinigitajn cigaredojn aŭ proponas mirindajn filtrilojn; videble la fumemo estas bona afero ! ... Kaj la filtriloj estas kvazaŭ truitaj kondomoj. Kiel jam dirite : la surprizo alvenas poste !

## L I B E R E C O

La sama socio, kiu malŝate rigardas la longharulojn, estas sufiĉe kompleza por la fumantoj.

La longaj haroj povas esti puraj; eĉ se ili ne havas plaĉan aspekton, nenio devigas, ke oni rigardu ilin. Plej ofte oni ne povas rimarki ilian proksimecon per la nazo kaj sekve la apudeston de longharulo !

Male, la fumanto trudas sian fumon, kvazaŭ la pura aero estus bezono nur por subevoluintoj, primitivuloj plenrajtaj iri aliloken, se al ili ne plaĉas la odoro. Vagante laŭ la stratoj, starante aŭ sidante en kolektiva transportrimedo, atendante antaŭ giĉeto de stacidomo aŭ publika oficejo, kiu ne havis la nazon trafita de tiaspeca odoro, miksaĵo de putranta fiŝo kaj konsumiĝanta fojno ? Kiu aŭdacis diri : "Mi tre ŝatas la puran aeron" kaj tiel ofendi la rafinitan guston de la modernaj homoj?

Aerfuŝantoj havas plenan liberecon ĝeni la normalajn - ne normaligitajn - homojn. Kiu vizitas la "simian fakon" de zoologia parko, povas vidi la ĉefajn specojn de simioj troveblaj en la mondo; kiu uzas la kolektivajn transportrimedojn de Parizo kaj de ties ĉirkaŭurbo, havas sendube la plej valoran specimenaron de ĉiuj imageblaj fumantoj ekzistantaj en la mondo. Estas neeble priskribi

ĉiujn. Do necesas elekti.

Jen la malplej riproĉinda tipo : la fumanto forĵetas sian cigaredon antaŭ ol eniri la vagonon aŭ kupeon por nefumantoj; ĉu per tiu sinteno li ne konfesas, ke la aero de la vagonoj por fumantoj estas aĉa ? Sed troviĝas en tiu kategorio personoj. kiuj ne scipovas uzi la nazon por spiri, tiel ke la buŝo anstataŭas ĝin kaj eligas odoron multe pli aĉan kaj malagrablan ol la tabakfumo mem.

Alia kategorio meritas apartan mencion : la obsedatoj, precipe observeblaj en la metrostacioj. Ili enspiras kiel eble plej da fumo antaŭ ol eniri la vagonon (en kiu estas skribite : "Estas malpermesate kraĉi kaj fumi") forĵetas la cigaredon kaj, kiam ili estas en la vagono, tiam ili elbuŝigas aŭ elnazigas fumnubon.

Inter la plej ridindaj troviĝas la ekshibiciemuloj. Bonaj karikaturoj de aktoroj, influitoj de la kinbildoj. Ili bezonas montri, ke ili fumas. Ne por la plezuro fumi, sed por la memkontento scii, ke oni vidas ilin fumi. En tiu kategorio, sufiĉe ampleksa, ekzistas kruciĝproduktoj de la jam cititaj obsedatoj : ili ĉelipigas aŭ eĉ ekbruligas cigaredon antaŭ ol elvagoniĝi.

Inter la patologiaj kazoj necesas ankaŭ aldoni la personojn, kiuj fumas, konscie aŭ ne, en vagonoj por nefumantoj. La virinoj ĝenerale montriĝas multe pli inteligentaj tiurilate, escepte de tre malmultaj junulinoj, kies personeco ne atingis difinitecon.

Estas evidente, ke la menciitaj kazoj konsistigas minoritaton, kiun eĉ la plimulto el la fumantoj malaprobas.

Tio estigas gravan demandon : Ĉu la fumado estas tolerebla en la kolektivaj transportrimedoj, ĉefe urbaj kaj antaŭurbaj, kiam la vojaĝo ne daŭras pli ol unu horon ?

En la jaro 1974, la S.N.C.F. (Nacia Societo de la Francaj Fervojoj) faris opinisondon, kaj tiucele disdonis demandarojn al la trajnuzantoj. La rezulto estis fiasko. Ĉu la iniciatintoj neniam konsciis, ke se la S.N.C.F. jam ne estas kapabla respektigi preskribojn, kial ĝi petas de la klientoj, ke ili esprimu siajn dezirojn pri pliaj faciligoj, aranĝoj, ke ili sugestu ion ?

Kolektivaj transportrimedoj estas ofte nepopularaj, ne nur pro la fakto, ke ili estas plenplenaj dum kelkaj horoj, ne ĉiam oportunaj, sed ankaŭ pro la peza menso de kelkaj

uzantoj. Ne malmultaj estas la vojaĝantoj, kiuj preferas stari en vagono por nefumantoj, ol sidi en vagono por fumantoj. Necesas ankaŭ paroli pri alia observebla fenomeno : povas okazi, ke aro da personoj sidas en vagono aŭ atendejo kaj ke neniu fumas; sed sufiĉas, ke iu ekbruligas cigaredon, por ke 2, 3, 4 aŭ pli el la kunestantoj faru, ŝafe aŭ simie, la samon. Tio montras, ke ne temas pri vera bezono, sed nur pri spiritvakuo ĉe multaj fumantoj kaj nekonscio pri la limoj de ilia kaj alies libereco.

Koncerne la materian flankon, ofte okazas, ke cindra brultrueto sur sidloko estigas ŝiriĝon de la tuta tegaĵo. La fumo malpuriĝas la farbon kaj tiel donas impreson pri ega malpureco.

En aŭtobusoj kaj aŭtomobiloj, la karbona dioksido (CO) kiun entenas la fumo, malpliigas la vidkapablon kaj la refleksojn de la ŝoforo. Tiel, ke en Svedio oni faras CO-dozkontrolon post akcidento.

Dum en Francio ekzistas vagonoj kun indikoj "non-fumeurs" (nefumantoj), pri kiuj oni ne tiom atentas, ĉar la SNCF-administracio ne donas al siaj kontrolistoj la rimedojn por lukti kontraŭ tio, en Britio la afero estas iom pli klara kaj preciza : "No smoking - Maximum penality L 10" (Ne fumu - maksimuma monpuno : 10 pundoj). Ĉi-lasta solvo estas la sola, per kiu la "patologiaj kazoj" fariĝas normalaj; admoni ilin, tio estas doni al ili plian ŝancon, por ke ili denove ekbruligu cigaredon tuj post la foriro de la kontrolisto kaj trovu en tio grandan memkontenton.

En Prago, la fumado estas malpermesata en la koridoroj kaj vagonoj de la subtera fervojreto kaj en multaj publikaj lokoj. En la ŝtato Arizono (Usono), fumado estas malpermesata en publikaj oficejoj. En Munkeno, la S. Bahn havas vagonojn nur por la nefumantoj (ekde la 1-a de feb. 1973). Post enketo en kiu montriĝis, ke 87 % el la vojaĝantoj favoras tian iniciaton, la urbo Hamburgo sekvis tiun ekzemplon.

Kaj nun, necesas pledi por la "pasivaj fumantoj" aŭ "malgraŭvolaj fumantoj". Ili havas la misŝancon vivi kun tiaj imperiistaj aermastroj, ĉe la laborejo aŭ hejme, survoje al unu aŭ la alia, en atendejoj, ktp.

Esplorlaboroj montris, ke la fumo, kiun enspiras fumanto, entenas malpli da gudro kaj nikotino ol tiu de la media aero. Tiel, laŭ profesorino G. Scasselati Sforzolini (asistantino de Prof. A.Seppili, direktoro de la Higien-Instituto de la Universitato de Peruĝo), persono, kiu fumas cigaredon "Edelweiss" (sen filtrilo) enspiras 16,9316 mg da gudro, dum 29,4526 mg iras en la median aeron (kun filtrilo, la kvantoj estas respektive 7,1026 mg kaj 30,3605 mg). Da nikotino la fumanto enspiras 0,9526 mg (sen filtrilo) dum 1,2960 mg iras en la median aeron (kun filtrilo, resp. : 0,4913 mg kaj 1,4670 mg). Oni konstatas, ke la filtrilo ne forigas la danĝeron por la fumanto, dum ĝi favoras plian malpurigon de la media aero.

Jam en 1942, dekano Fabre (Fakultato de Farmacio de Parizo) trovis 1,5 mg da nikotino en sia lastnokta urino, t.e. kvazaŭ li estus fuminta 7 aŭ 8 cigaredojn. Li estis trapasinta la antaŭan vesperon kun amikoj, kiuj fumis. Aliaj eksperimentoj pruvis la samon, kaj Prof. Fabre proponis, ke fumado estu malpermesata en la kinejoj de Francio; lia propono estis akceptita.

Ok-hora restado en loko, kie fumas pluraj personoj, estas por pasiva fumanto, kiel fumado de 20 cigaredoj.

"Kaj tiu manko de oksigeno trafas ĉefe la nervajn ĉelojn, kiuj konsumas meze 4 ĝis 5-oble pli da oksigeno ol la aliaj ĉeloj de nia organismo". (D-ro Maud Cousin, ĝenerala sekretariino de la Nacia Komitato kontraŭ Tabakismo, Francio).

"Ni vidas plie, ke la tabako agas favore al la trombozoj kaj kretenismo indikantaj sangcirkulajn kaj nervajn perturbojn, kiujn estigas la fumo." (Dro Maud Cousin)

Kiel ekspliki, ke la ŝtatoj ne tiom emas malaperigi tiun plagon ? Jam estis priparolitaj la mono, la timo antaŭ balotoj, la dependecigo de la civitanoj kaj la konservado de la ŝtataj strukturoj.

Skandalo, kiu okazis en la orfejo de Meudon (Francio), montras la simbolan forton de la cigaredo, forton, kiun bone konas la ŝtatgvidantoj.

40 sendefendaj orfoj havis de tempo al tempo la viziton de iu kuracisto, kiu metis sur ilian haŭton alveolojn kun eksperimenta pomado. Ĉiu infano ricevis 2 cigaredojn antaŭ la eksperimento, kaj poste 10 cigaredojn aŭ bombonojn;

kiu varbis aliajn, tiu ricevis plian donacon de kelkaj cigaredoj kaj la silento de la direktoro kostis nur 150 frankojn. Kiam la afero diskonatiĝis, iu infano diris :

"Ni estis timigitaj, ni estis obeemigitaj pro la disciplino, sed la movado de la liceanoj helpis nin havi la kuraĝon denunci tion."

La ŝtato ne metas alveolojn sur la haŭton de la civitanoj, sed monsuĉilojn por iliaj monujoj. Ĝi respektas la liberecon de la fumantoj, ĉar ili havas ĝin kontraŭ pago; libereco ja estas sanktega afero. La senpaga libereco de la nefumantoj, kiuj sopiras aŭ eĉ pretendas pri rajtoj rilate la puran aeron, tio estas verŝajne "falsa problemo".

La ŝtato persekutas la narkotistojn, ĉar ili estas ekster la sankta vojo, kiu kondukas la monon al la ministerio por financoj, ĉar ili ne estas sufiĉe agresemaj por fariĝi taŭgaj kakiuloj. Ilia "infera paradizo" tro konkurencas la krimlernejojn pli subtile kaj ĝentile nomataj armeoj. Ankaŭ la eksterleĝa narkotaĵkomerco kontraŭas la sanktajn principojn de la ŝtato. Tion pruvas la jam citita afero pri opio en Hindoĉinio kaj la sinteno de Usono, kiu klopodis en 1973/74, por ke la turka registaro ĉesigu la papavkulturon. Kompreneble, narkotaĵoj vivigas lukse malgrandan aron da fiuloj, sen profito por la ŝtato, dum male la tabako donas vivrimedojn kaj laboron al multaj homoj, kiuj provizas multajn aliajn per mortrimedo kaj antaŭtempa eterna ripozo.

Ĉio bona, kondiĉe, ke la ŝtato enspezu !

## T A B A K I S M O kaj I N C E N D I O J

Laŭ "Le Journal de Genève" (29an de sept.1972), de 1500 ĝis 2000 incendioj okazas ĉiujare pro nezorgemo de fumantoj, t.e. proksimume 5 ĝis 7 % el ĉiuj incendioj nur por Svisio. Temas plej ofte, kaj feliĉe pri negravaj ekbruloj.

Laŭ la sama fonto, la asekurkompanioj taksas je 50 la nombron da incendioj ŝulditaj al fumantoj, kiuj ekbrulis cigaredon post enlitiĝo. Ne ĉiuj mortas, sed okazas ankaŭ, ke aliaj personoj pagas per sia vivo tiun geston de senkonsciulo. Sed la Svisoj ne havas la monopolon de la stulteco :

Pariza hotelo brulis dum la nokto de la 25/26a de januaro 1974; tri personoj mortis, sed ne tiu, kiu kulpis.

La vorto "katastrofo" ne estas troa en kelkaj okazoj:

En Saint-Laurent-du-Pont (Francio), fumanto ĵetis neestingitan alumeton en dancejo : 149 gejunuloj mortis.

En Japanio, la 29an de novembro 1973, granda magazeno brulis en Kumamoto; kaŭzo : cigaredo; efiko : 102 personoj mortis kaj proksimume 100 aliaj estis vunditaj.

La 16an de aprilo 1947, Texas City (Usono) estis detruita pro cigaredstumpo. Dum malŝarĝado de la ŝipo "Grandchamp", kiu transportis interalie amonian nitraton, iu dokisto kaŝe fumis cigaredon malgraŭ la strikta malpermeso kaj poste forĵetis ĝian neestingitan stumpon. Ekis malgranda incendio, kiujn la fajrobrigadanoj ne sukcesis haltigi; ĝi progresis kaj baldaŭ atingis la danĝeran varon. La ŝipo eksplodis kaj novaj eksplodoj estigis aliajn : rezultis terura bilanco : 554 mortintoj, 3600 vunditoj, 12.000 senhejmigitoj.

La narkotistoj fuŝas nur sian sanon, sed endanĝerigas nek la sanon, nek la vivon de aliaj homoj, kaj ne trudas sian manion.

Simpla rimarko !...

## K A T A S T R O F O   N E K A T A S T R O F A

La usonaj gazetoj tutcerte ne aperigas ĉiutage tiajn titolojn :

"Hieraŭ, 985 Usonanoj mortis pro la tabako" aŭ

"Hieraŭ, 1015 Usonanoj forpasis pro tabakismo" ...

Tiaj katastrofoj ne impresas la homan imagon. Cifero per si mem ne havas emociigan forton; ĝi devas esti inkluzivita en kunteksto, kiu reliefigas ĝin.

360.000 mortintoj en unu jaro ?

Se katastrofo, kiel tiu de "Titanic" (ŝipo, kiu subakviĝis la 15an de aprilo 1912 post kolizio kun glaciinsulo; 1513 personoj pereis) okazus 240 fojojn en unu jaro, tio estus pli okulfrapa. Se 1000 aviadiloj DC-10 falus, kiel en Ermenonville (1974) en unu jaro, eble la ĵurnaloj komence aperigus grandajn titolojn kaj poste tio fariĝus tute ordinara informo per kelkaj linioj resumebla, aŭ eble ankaŭ ili reagus por ke "oni" faru ion kontraŭ tio.

Se ĉiujare 10 vulkanoj, kiel Krakatoa (1883 : 36.000 mort.) aŭ 9 kiel Montagne Pelée (Martiniko, 1902 : 40.000 mort.) forbalaus insulojn aŭ urbojn, aŭ se tertremoj detruus 30 urbojn kiel Agadir (1960), eĉ tio fariĝus iom post iom banalaĵo, same kiel la trafikakcidentoj.

Atombombo, kiel tiu de Nagasako (75.000 mort. en 1945) ekskuis la homan konsciencon, sed ne faris la homon pli saĝa.

Se la prezidento de Usono, okaze de la mesaĝo pri la "stato de la Unuiĝo", aldonus :

"Lastjare, por la prospero de nia lando, ni devis rezigni pri 360.000 homaj vivoj. Niaj teknokratoj zorge pristudis la aferon. Tial, ni liberigis la plej spertajn krimulojn kaj eĉ dungis pliajn, por ke ili estu entute 30.000. Ili ricevis salajron kondiĉe, ke ĉiu el ili mortigu unu homon monate - nek pli, nek malpli - kaj ke tiu homo estu nepre pli ol 35-jara. Ili bone plenumis sian taskon kaj socian rolon. Tiel, ne nur tiuj 30.000 krimuloj trovis honorindan situacion, sed ankaŭ, ili donis laboron, kaj sekve vivrimedojn, al multaj aliaj homoj. La ĵurnalistoj, la gazetaro, la fabrikantoj de murdiloj, la kuracistoj, la presistoj de anonc-kartoj, ĉiuj trovis dank'al tio laboreblecon. Ni ne forgesu ankaŭ la ĉerkfabrikadon, la komercon de artefaritaj kaj naturaj floroj, la enterigajn entreprenojn, la tombofosistojn, kaj tiel plu, kaj tiel plu, kaj tiel plu. La materia feliĉo de la postrestantoj postulis tion. Cetere, ĉio en ordo."

Eble tiam la popolo havus motivon por ribeli. Sed la popoloj, kiuj ribelus kontraŭ tia cinikeco en paroloj, ne konscias, ke ĝuste tia cinikeco esprimiĝas ĉiutage per agoj kaj faktoj, en la politiko de ĉiuj ŝtatoj.

--=o=--

Gérant & imprimeur : Baudé, 47340 Laroque

☐ 2 Mi mendas jenajn broŝurojn:

| | Prezo en FF | Nb | Sume |
|---|---|---|---|
| Lanti: Absolutismo (prelego de E.Lanti) | 1. | | |
| R.Levreaud: Atomcentraloj (debato) | 1,25 | | |
| Duboin/Berthier: Abundo kaj konsumsocio | 2. | | |
| Malatesta: Anarkio kaj organizo | 1,25 | | |
| ✻ H.D.Thoreau: Civila Malobeemo + studo pri H.D.T | 1,50 | | |
| Pario: Durruti, simbolo de la hispana revolucio | 1,25 | | |
| LJP: Espéranto en 24 pages (por franclingvanoj) | 1. | | |
| LJP: Esperanto en 24 páginas (por hispanlingvanoj) | 1. | | |
| Lanti: El leteroj de E.Lanti | 1,50 | | |
| Krishnamurti: Eduko kaj vivsignifo | 1,50 | | |
| Gandhi kaj satjagraho (tri prelegoj pri) | 1,50 | | |
| ✻ Lanti: Herezulo - Herezaĵo | 1,50 | | |
| ✻ A.Pannekoek: Historia Materiismo - Organizado | 1,25 | | |
| Eugen Relgis: Humanitaristaj Principoj | 1,25 | | |
| An Kaŭ: Initiation à l'espéranto(por franclingv.) | 1,50 | | |
| ✻ Han Riner: Individuista Manlibreto | 1,50 | | |
| Dakapo: "Kiĉuaro" al Junulkurso(evoluiga didaktiko) | 1,25 | | |
| ✻ Sébastien Faure: La Krimoj de Dio | 1,50 | | |
| ✻ Han Riner: La Kvina Evangelio | 6. | | |
| Lanti: La laborista esperantismo | 1,25 | | |
| La liberecana penso (citaĵoj kolektitaj de Lib.Fr.) | 1,25 | | |
| ✻ Fontaura/J.Grave: Liberecanaj vivkonceptoj | 1,50 | | |
| La Boétie: Memvola servuto | 1,50 | | |
| ✻ N.Bartelmes: Mia vivo - Dek artikoloj | 2,50 | | |
| ✻ Roza Luksemburg: Naciecaj problemoj | 1,50 | | |
| Rufegon: Manlibro de nova homo | 1,50 | | |
| Leo Tolstoj: Ne mortigu! | 0,50 | | |
| S.J.Lec: Nekombitaj pensoj | 1,25 | | |
| T.Ebert: Ĉu neperforta revolucio... | 1,25 | | |
| E.Bellamy: La parabolo pri la cisterno | 0,75 | | |
| Lanti: Pri edukado (el "Vortoj de kdo E.Lanti") | 1,50 | | |
| Paul Lafargue: La rajto de pigro (pamfleto) | 1,50 | | |
| A.Cohen: Paco en proksima Oriento | 1,25 | | |
| Por la paco (citaĵoj kolektitaj de Pacista Fr.) | 1,50 | | |
| Prognozio (novelaro el la pola) | 1,25 | | |
| F.Domela Nieuwenhuis: La piramido de l'tiranismo | 1,50 | | |
| ✻ Kropotkin: Revolucia registaro - Anarkista agado | 1,50 | | |
| H.Masson: Du rêve à la réalité : l'espéranto | 1,50 | | |
| ✻ H.Masson: Tabakismo kaj emancipiĝo | 2. | | |
| ✻ J.Ingenieros: La triviala homo | 3,50 | | |
| ✻ Johano Rostand: Tiu, kiu ne volas morti | 1. | | |
| Alfa-Beta: Tra la mondo per biciklo kaj esperanto | 1,50 | | |
| M.Schneller: Vivi en komunumo | 0,75 | | |
| | SUME: | | |

# Broŝur-Servo

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
pĉk: 3 374 04 Bordeaux
ĉekoj: samadrese.

1975

## Abonilo/Mendilo

NOMO: ........................ Antaŭnomo: ........................

Adreso: ........................................................

Poŝtkodo: ......................................................

☐ 1 abonas la broŝuran serion de LJP por la jaroj 1975/76 je favora prezo (20 FF) kaj ricevos la broŝurojn signitajn per (❀) Vd.dorsflanke ☐

+

☐ 2 mendas broŝurojn laŭ la ĉi-dorsa listo ...... ☐

+

☐ 3 sendas jenan monprovizon por ricevi la venontajn noveldonaĵojn kun 20 % da rabato ...... ☐

☐ 4 ne estas SAT-ano kaj deziras ricevi informojn pri Sennacieca Asocio Tutmonda

☐ 5 ne estas abonanto de la gazeto "La Juna Penso" kaj deziras ricevi senpagan specimenon

Mi sume pagas per ☐ mono, ☐ poŝtĝiro, ☐ ĉeko, ☐ poŝtmandato, ☐ respondkup. ☐ alia pagilo: ☐

Sugestoj :

Dato kaj subskribo:

Ŝtopu per kruco la taŭgan kvadraton.